

& Festeno:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 841 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroe sudinsula melodio de Drako Longa kaj disdivido na strofoj. Vortludoj (*): '6 Homaro – france sonon h oni ne elparolas. '10 Toleremo demokratia. '13 Klasbatalo socialisma. '15 La apetito. '18 Centra. '25 Komploto. '29 Gazeto.>

(#Melodio:

<:29> (#Suđuroy; /dolSo LaTi dodo dooTiTi TiLa LaSo SoMi; So LaTi dodo dooTiTi TiLa LaSo LaSo;

(#Rekantaĵe: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire doTi La;So So LalTi do o)

)×29)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Kunsidis por festeno, pretegaj al atakoj, ; Dum ĝua koncentriĝo almenaŭ cent stomakoj,

(×:;Bruas danco en halo, dancu en ĉen'! ; Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.)

'2 Kaj akra saŭcodoro simile al incito ; Kreskigis la mezuron de sana apetito.

,& Dua:

'3 Jam kuŝis sur la tablo, – pli ĝuste sur l' altaro – ; La ofertita besto, kaj estis ĝi omaro.

'4 Omaro netranĉita, en sia tuta formo ; Aspektis ŝafe milda kajen profunda dormo;

'5 Videble pri marbordoj ĝi songis sensuspekte, ; Sed saĝa festenano leviĝis kaj afekte

'6 Kun larma emocio li plendis al najbaro: ; "Ĝi ne efektiviĝos, la songo de l' omaro*!!"

,& Tria:

'7 Kaj en regula takto dufoje cent makzeloj ; Movigis dum maĉado santiom da oreloj...

'8 Dank' al kaprica vino ruĝiĝis palaj vangoj ; Kaj babileme tiam sin movis ĉiuj langoj.

'9 Pri arto, pri scienco kaj nun pri politiko ; Sagace sin ekzercis diskuto kaj kritiko,

'10 Sed ŝvebis harmonio eĉ super tikla temo, ; Ĉar ĉiuj sin distingis per vera... teleremo*!!

,& Kvara:

'11 Fervora komunisto predikis elokvente ; Pri nova ŝtatsistemo kaj montris argumente

'12 Disigajn diferencojn de diversrangaj klasoj... ; Dum fajro de l' diskuto li el najbarojglasoj

'13 Trinketis senatente, – sed tiu ĉi detalo ; Klarigas l' originon de ĉiu... glasbatalo!*

,& Kvina:

'14 Subite tra la pordo – (ĝi estis nefermita) ; Eniris grava viro kaj venis seninvita.

'15 Ni scias laŭ proverbo, ĉu ne, ke "la petito"* ; Dummanĝe venas", tamen jen venis nepetito!

'16 Kaj tiu grava viro, suĉinte kokan oston, ; Pri sia personeco komencis longan toston.

'17 – La mutaj samtabloj konjektis kun angoro: ; "Ho, Dio, kiom tostas ĉi tiu oratoro!?" –

'18 De Ventra* Komitato leteron li laŭtlegis, ; Laŭ ĝi oficiale lin mem oni delegis,

'19 Por ke oficiale ĉeestu li festenon ; Al ĉiuj alportante oficialan benon.

'20 Ĝistede li insistis per tiu ĉi formulo: ; "Resume do mi estas la Oficialulo!"

,& Sesa:

'21 En tiu ĉi momento veplenda ĝemsopiro ; Haltigis la torenton de nia verva viro,

'22 Kaj baldaŭ multobliĝis la krioj kaj la ploroj, ; Kaj multaj festenanoj tordiĝis pro doloroj

'23 Frotante ŝvelan ventron, kaj tiel, per mimiko, ; La suferantoj plendis sendube pri koliko!

'24 Jam kelkaj naivuloj kun tima superstiĉo ; Akuzis l' oratoron pri tiu malfeliĉo,

'25 Sed iu, almontrante al jam malplena pototo, ; Ekkriis: "Ne! – Ni estas viktimoj de... kompoto*!!"

,& Sepa:

'26 Kaj nun sin manifestis fatalo senkompata, ; (Prefere mi silentus pri punkto delikata!)

'27 Sed malgraŭ diskretemo de ĉasta embaraso ; Aŭdiĝis bru' simila al eksplodanta gaso,

'28 Kaj sub venĝanta premo perfida de skrupulo ; Honteme ekruĝiĝis... la Oficialulo!...

,& Oka:

'29 Saĝuloj tuj konkludis, facile, sen enketo: ; "La Oficiala... Gaseto*!!"